Horizon-TAAL

Jaargang 48 - nummer 279 bis mei-juni 2016



www.esperanto.be

Met steun van de Vlaamse Gemeenschap

INHOUD

Tweemaandelijks tijdschrift, uitgegeven door de Vlaamse Esperantobond v.z.w.
48ste jaargang - mei-juni 2016
Verschijnt de 1ste van elke oneven maand.
Overname van artikelen is vrij op voorwaarde dat de bron wordt vermeld en een exemplaar aan de redactie wordt gestuurd

Redactie en administratie: Vlaamse Esperantobond v.z.w. - Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
tel.: 03 / 234 34 00 - Epost: horizon.taal@esperanto.be
webstek: http://www.esperanto.be/fel/nl

Abonnementen: 25,00 EURO

Rekeningen: t.n.v. Vlaamse Esperantobond, Antwerpen
KBC IBAN BE31 4025 5105 3155, BIC: KREDBEBB
de Post IBAN BE66 0000 2653 3843, BIC: BPOTBEB1

Redactie: Pieter-Jan Doumen

Tekstopmaak: Eriko D'Hondt

Medewerkers: Marc Cuffez, Ivo Durwael, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, André Ruysschaert, Jean-Pierre Van den Daele, Emiel Van Damme, Kris Panis, Mireille Storms, Ivo Vercammen e.a.

Verantwoordelijke uitgever: Pieter Jan Doumen, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

UNU KOMPLIKITA HISTORIO (1)

Estis iam unu simplanima franco, kiu hazarde aŭdis pri la ekzisto de ia internacia artefarita lingvo, kaj, interesite, demandis sin, kiu speco de homo elpensis tian eksterordinaran ideon. Li senprokraste iris viziti sian urban bibliotekon kaj tie konsultis la ĉefajn enciklopediojn. La *Grand Larousse Encyclopédique* de 1964 informas koncize, ke temas pri iu "Zamenhof Leizer Ludovik, médecin et linguiste polonais". La *Alpha-Encyclopédie* de 1969 instruas, ke Esperanto estas *une langue auxiliaire internationale créée par un oculiste polonais Zamenhof*. La *Encyclopaedia Universalis* de 1975, en la indekso de sia *Thesaurus*, opinias, ke *Es*peranto est *actuellement le seul exemple réussi de langue construite. Son créateur est le docteur polonais L.L. Zamenhof*". Fine la pli modesta *Quis* en 1977 asertas, ke "l'espéranto fut publié en 1887 par l'oculiste polonais L.L. Zamenhof".

Ŝajnas do certe, ke Esperanto estis donaco de Pollando al la homaro, kaj tiu novaĵo vekas en nia simplanima leganto senton de agrabla familiareco: tiu lando estis ĉiam ligita kun Francio per reciproka simpatio. Ĝiaj romantikaj poetoj en la 19a jarcento kaj ĝiaj pli prozaj ministoj en la komenco de la 20a jarcento trovis ĉe ni, li pensas, duan patrion, se ne mencii pli individuajn okazaĵojn, kiel tiuj francaj princoj, Louis d'Anjou kaj Henri de Valois (poste nia reĝo Henri III), kiuj dufoje, en la 14a kaj en la 16a jarcentoj, reĝis super ĝi, aŭ tiuj polinoj, kiuj dufoje dividis la sorton kaj alprenis la nomon de gloraj Francoj, grafino Hanska – de Honoré de Balzac, kaj Maria Sklodowska – de Pierre Curie.

Kontentigita, nia scivolemulo decidis lerni tiun lingvon kaj post nelonga tempo komencis entuziasme legi la verkojn de tiu geniulo. Sed tie atendis lin surprizoj: ekz-e en letero de 1889 li malkovras la frazon "Mia plena nomo estas Ludvigo Lazaro" kaj ruslitere *Ljudovik Markoviĉ Zamengof*, kio ne sonas pole kaj ne similas al la informo de la *Grand Larousse*. En alia letero de 1905 troviĝas jena aserto: *Mi nomas min Ruslanda Hebreo*. Fine en Kongresa parolado lin trafas senaverte jena alvoko: *Mi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo!* Kiel unu sola individuo povas samtempe loĝi en Varsovio, konfesi ke lia patrujo estas Litovujo kaj deklari sin Hebreo, t.e. ano de gento malaperinta jam de 20 jarcentoj? En tiu momento de perplekseco, nia samideano turnis sin al mi, petante helpon.

Nu, en tiu tempo mi mem baraktis meze de tiuj malfacilaĵoj. Amiko Lapenna estis jam petinta de mi en 1959 biografian resumon por lia granda *Memorlibro pri la Zamenhof-jaro*; sekve de la publikigo de tiu skizo, mi ricevis, fine de 1960, longan leteron de Polo, Kazimiro Domoslawski, kiu tre ĝentile atentigis min pri kelkaj eraroj kaj miskomprenoj. En tiu letero li reprenis la ĉefajn partojn de la n-ro 41a de la *Nica Literatura Revuo*. Denove tio vekis kontraŭdirojn, i.a. de la Litovo s-ro Klemento Naudžius. Bedaŭrinde La Nica intertempe ĉesis aperi, kaj mi ne povis doni lokon al tiu rebato. Mi estis do feliĉa trovi novan okazon restudi la tutan demandon kaj tiri el tiu polemiko kelkajn pozitivajn faktojn.

Pri la propra historia fono neeble estas eldiri ĉiujn detalojn: sur tiu vasta ebenaĵo, kuŝanta inter la Germanoj kaj la Rusoj, sin sekvis senĉesaj bataloj, invadoj, aneksoj ktp, kiuj tra la jarcentoj modifadis la limojn. En la 14a jarcento la situacio iom stabiliĝis: la koncernan regionon okupis tiam du ŝtatoj, unu reĝlando, Polujo, kaj unu granddukejo: ĉi tiun oni nomis latine Lituania, litove Lietuva, pole Litwa, ruse Litva; tradicie oni uzas en nia lingvo la formon Litovujo, sed miskomprenige estas uzi tiun popoldevenan nomon por la regno, kiu, tiutempe, kvankam fondita kaj regata de Litovaj princoj, etendiĝis de la Balta ĝis la Nigra Maro, de Brest-Litovsk ĝis trans Smolensk, kaj entenis ĝis la 17a jarcento Belorusion kun Minsk kaj Ukrajnon kun Kiev. Tial mi preferas la nomon Litvo, kiun elektis Grabowski en sia traduko de *Sinjoro Tadeo*: ĝi almenaŭ ne faras konfuzon inter la Litovoj kaj la Litvanoj. Polujo ka Litvo alianciĝis en 1386 per la edziĝo de grandduko Jogailo (aŭ Jagellono) al la pola tronheredantino Jadwiga (aŭ Hedviga de Anĵuo). Polujo estis multe pli malgranda, sed pli dense loĝata kaj ekonomie pli riĉa; Litvo estis pli disvastiĝinta, kaj precipe ĝiaj princoj havis tiun politikan genion, kiu tiel kruele mankis al Polujo dum ĝia longa historio. De la Poloj, kiuj ĝuis la prestiĝon de malnovaj rilatoj kun la latinida civilizo, la Litvanoj facile alprenis la religion, katolikismon, kaj la lingvon, kiu fariĝis la kuranta lingvo de la regantaj klasoj, dum la litovan parolis plu nur kamparanoj en la norda parto de la lando. Tiu stato de la aferoj daŭris, kun negravaj ŝanĝiĝoj, kvar jarcentojn, proksimume ĝis la 18a jarcento, kiam la tri potencaj najbaroj – Prusio, Aŭstrio kaj Rusio – decidis inter si partigi tiun pol-litvan regnon, kiun oni nomis simple Polujo, kaj kies loĝantoj ja havis tiom nur la elekton, laŭ la fama formulo, *inter la rusa malliberejo, la prusa tombejo kaj la aŭstra kaĝo*. La caroj alpredis la pli grandan parton de la lando, sed eĉ

sub tiu perforta okupado restis plu spuroj de la distingo inter Pollando kaj Litvo: la unua fariĝis la Reĝlando de la (Viena) Kongreso, la dua dividiĝis en apartajn gubernioјn, tiel ke tradicie la loĝantoj de tiu regiono nomis sin Litvanoj (= Litovoj, laŭ la kutimo de Zamenhof), ĉu ili estis Poloj, Belorusoj, judoj aŭ Litovoj. Pri tiu geografia senco, kiun konservis en la 19a jarcento la nomo Litvo-Litovujo, restas kelkaj frapantaj ekzemploj. La plej granda pola poeto, Adam Mickiewicz, komencas sian nacian epopeon *Sinjoro Tadeo* per ĉi tiu verso (en la traduko de Grabowski): *Litvo! Patrujo mia, simila al sano…*

Eĉ en tempoj pli proksimaj al ni, ne mankas restoj de konfuzo inter Litovoj kaj Litvanoj. En 1922, dum la litova nobelo Naruševičius subskribis la akton pri la sendependiĝo de la nova, etna Litovujo, lia frato Narutowicz estis elektita prezidento de nova pola respubliko. Mia korespondanto citas ankaŭ la nuntempan disecon de tri fratoj, el kiuj unu, la universitata profesoro T. Ivanauskas, deklaras sin Litovo, la dua rigardas sin Polo, kaj la tria asertas sin Blankruteno (t.e. Ukrajnano).

Tio klarigas la ekkrion de Zamenhof pri sia patrujo Litovujo: naskite en Bjelostoko, urbo, kiu dum la antaŭa jarcento kuŝis ekster la limoj de la Pola Reĝlando, li ne povis difini sian lokan apartenecon alie, ol kiel Litovo-Litvano. Tiun alligitecon malkovras cetere ne nur la indignanta denunco pri la *bestega Bjelostoka buĉado* en lia oficiala parolado antaŭ la Ĝeneva Kongreso, sed ankaŭ aliaj, apenaŭ rimarkeblaj spuroj.

Ankaŭ pri sia genta aparteno li ne povis heziti: liaj geavoj kaj gepatroj estis judoj kaj lia naskiĝa urbo estis praktike juda, pro la minoritato da Poloj kaj kvankam submetita al la rusa regado kaj al la germana ekspluatado. Kaj ĉar la judoj de tiu regiono distingiĝis de siaj samgentanoj en la pola regno per apartaĵoj en sia uzado de la jida lingvo kaj precipe per sia kulturo kaj idearo, tio povis nur akrigi ilian senton aparteni ne al Polujo sed al la iama Litovujo-Litvo. Kurioza atesto de tiu spritostato estas ruslingva letero de Zamenhof en 1882: "La junuloj de Varsovio, precipe el la kleraj familioj, estas indiferentaj pri tiu demando (t.e. judismo). Ili rigardas sin kiel Polojn kun juda religio. Do ni, la litovaj judoj en Varsovio, havas la devon veki ĉe ili simpation por nia popolo." (HZL p. 9)

Sed super tiu loka kaj genta aparteneco ekzistas ankaŭ la politika: kaj ĉi tie oni ne devas konfuzi la sintenon de la patro Marko kaj tiun de la filo Lazaro. La patro, kiu, same kiel la avo, estis instruisto de la germana kaj franca lingvoj, volis certigi al si sekuran situacion por povi doni la plej bonan edukadon al siaj infanoj. Kaj ĉar ankoraŭ ne komenciĝis la periodo de la grandaj pogromoj, li penis fariĝi lojala funkciulo de la rusa imperio, tuj kiam li atingis, unue en Bjelostoko, poste en Varsovio, la postenojn de ŝtata instruisto pri la germana lingvo kaj fine de cenzuristo pri la publikigaĵoj en la hebrea kaj la jida lingvoj. Estis do logike, ke en sia hejmo li trudis la uzadon de la sola oficiala lingvo: la rusa. Zamenhof mem atestis pri tio sur poŝtkarto al Th. Ĉejka: *La lingvo de mia gento estis la lingvo rusa* (28.02.1906, HZL p. 117). Kaj por li tiu uzado ne estis simple deviga, ĉar en sia fama letero al Michaŭx (21.02.1905), li konfesas:

Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukita, t.e. la lingvon rusan; mi lernadis ĝin kun la plej granda plezuro; mi revis iam fariĝi granda rusa poeto (en la infaneco mi skribis diversajn versaĵojn, kaj en la 10a jaro de mia vivo mi skribis 5-aktan tragedion). (LZ.I. p. 110-111) Unu detalo montras, kiagrade li sukcesis plenumi la deziron de la patro pri la akiro de pura rusa stilo: en la matureca ekzameno (t.e. la abiturienta), per kiu finiĝis liaj studoj en la Varsovia Vira Gimnazio, li ricevis por sia ekzercaĵo en la rusa lingvo la noton 4 (maksimumo: 5), kun jena rimarko de la korektinto: *La lingvo de tiu ekzerco estas tre bona… ĉie la lingvo estas regula, facila kaj entute libera de polismoj. La Komisiono ne povas ne ŝati tion en lernanto.* (Halina, p. 125) Tio signifas por ĉiu kompetentulo pri pedagogio, ke la juna Zamenhof lernis la rusan senpere, rekte en la hejmo kaj en la lernejo. Se, kiel pluraj biografoj diras aŭ supozigas, li estus kutimiĝinta en Varsovio paroli plej familiare la polan lingvon, li ne estus povinta eviti tiujn polismojn, kiuj svarmis en la ekzercaĵoj de siaj samklasanoj.

La pola estis por li la dua- aŭ triaranga esprimilo apud la germana aŭ la jida (kiu cetere estas nur germana dialekto kun hebreaj aŭ rusaj enfiltraĵoj), ĝis la tempo kiam Esperanto superis ilin ĉiujn! Eĉ la maturiĝintaj filoj de Lazaro uzis inter si la rusan, laŭ atesto de Wanda Zamenhof al J. Kohen-Cedek. Nur la sekvanta generacio adoptis la polan kiel hejman lingvon. Kompreneble kun polaj vizitantoj Zamenhof parolis pole, sed tiu ago de ĝentileĉo ne sufiĉas por pravigi la opinion de certaj biografoj.

Tiu kompleksa situacio de la ruslandaj judoj speguliĝas en ilia nomaro. Ĉe la naskiĝo, okaze de la cirkumcido, la rabeno donis al la infano hebrean nomon, ekz-e por nia majstro: Eliezer. Sed en la ordinara vivo oni uzis la jidan formon, Lejzer, kaj en la rusaj dokumentoj oni trovas la respondan rusan formon Lazar. Kaj, ĉar tiu juda nomo povis ĝeni dum interrilatoj kun nejudoj, la koncernato ofte elektis al si kristanan antaŭnomon, tiel nia majstro ricevis ankaŭ la antaŭnomon Ludoviko.

(1887 kaj la sekvo… de Gaston Waringhien)

NASKIĜO DE IKONO: LA VOLKSWAGEN

Antaŭ 70 jaroj startis en la germana Wolfsburg la seriproduktado de unu el la absolutaj ikonoj de la historio de la aŭto: la Skarabo de Volkswagen. Entute ĝis la fino de julio 2003 estis konstruitaj tie 21 milionoj da ekzempleroj.

La Skarabo estas infano de la nazia Germanio de la tridekaj jaroj de la antaŭa jarcento. La tiel nomata KdF-aŭtomobilo devis fariĝi la aŭto de la germana popolo, la Volkswagen (aŭto de la popolo). Tamen dum la regado de Hitler nur 630 ekzempleroj estis produktitaj. En la fabriko kiu estis speciale konstruita por la Skarabo, estis faritaj ĝis la kapitulaco de Germanio en 1945 precipe armiloj. Tio okazis en la ruinoj de fabriko, kiu estis trione neniigita per bombardoj. Antaŭ la jarfino de 1945 oni kunmetis nur 55 aŭtojn. La vera seriproduktado startis en januaro 1946, kvankam oni devas preni tiun terminon neserioze.

Ke la Skarabo fariĝis tiel populara aŭto post la milito, ĝi grandparte dankas al la brita majoro Ivan Hirst. En junio 1945 la fabriko de Wolfsburg estas metita sub la aŭtoritato de la angloj, kaj Hirst estas nomita ĉefo de la entrepreno. Li trovis la projekton de la Skarabo sub la polvo kaj komencis produkti aŭtojn por la brita administracio. Kvankam privatuloj povis aĉeti la aŭton nur ekde 1948, la Skarabo ĉiam pli ofte aperis sur la stratoj. En la kamparo ĝi estis uzata de la medicinaj servoj. Sub la gvido de Hirst la fabriko estis modernigita kaj reto da vendistoj organizita. Jam en 1945 Hirst instalis entreprenan konsilion, kaj la fabriko estis demokratigita. Ekde 1947 la Skarabo estis eksportata. La fabrikoj de Pon en Nederlando kaj de D'Ieteren en Belgio estis inter la unuaj eksportistoj. Ĝis la fino de la sepdekaj jaroj oni konstruis en Vorst apud Bruselo pli ol unu milionon da Skaraboj en fabriko, kiu tiutempe apartenis al D'Ieteren. Oni rakontas, ke post la milito la angloj volis origine transdoni la Skarabon al Ford. Sed la usona aŭtokonstruisto ne kredis pri bona estonteco por la pedanta aŭteto.

La unuaj projektoj de la Skarabo datiĝas jam de longe antaŭ la Dua Mondmilito. En 1933 la jam tiam konata inĝeniero Ferdinand Porsche ricevis de Hitler la taskon konstrui aŭton, kiu estas pagebla por ĉiuj germanaj familioj. La aŭto devis havi sufiĉan lokon por du plenkreskuloj kaj tri infanoj, atingi pintan rapidecon de 100 kilometroj, konsumi ne pli ol sep litrojn por cent kilometroj kaj kosti malpli ol 1000 germanajn markojn.
Sub la impulso de Hitler la Volkswagen estas renomita "Forto per Ĝojo", sed estas la *New York Times* kiu en 1938 unuafoje nomas ĝin "Beetle" (Skarabo). En la ĉirkaŭaĵo de Fallersleben oni konstruis fabrikon kun loĝejoj por la laboristoj kaj iliaj familioj.
Sukceso havas multajn patrojn, kaj pri la patreco de la Skarabo estis lanĉitaj multaj procesoj. Oni longe konsideris Porsche kiel la projektanton de la Skarabo, sed li ne estis la sola kiu kontribuis al ĝia ekzisto. Tiel jam detala koncepto de la Skarabo estis projektita en 1925 de la aŭstra konstruisto Béla Barényi, sed li forgesis demandi la necesajn patentojn por sia kreado. Nur en



1953 lia kontribuo estis rekonita de germana tribunalo.

La aŭto havis sian premieron en 1933 en la aŭtosalono de Berlino. Hitler estis tre entuziasma.
La Skarabo tuj havis tutmondan sukceson. Ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en Usono, kie la kompakta kaj ŝparema aŭteto kun sia fidinda kvarcilindra boksermotoro, per kiu tutaj generacioj da junuloj lernas konduki, estis tre populara. La Skarabo kun la numero 53, kiu ricevis la anglan nomon Herbie, havis sukcesan karieron en Hollywood. En 1972 la Skarabo preterpasis la Ford T kiel la plej ofte produktata aŭto en la mondo. En 2003 la lastaj ekzempleroj estis konstruitaj en Meksiko. Entute estis venditaj tutmonde 21,5 milionoj da ekzempleroj.
Dum ĉiuj tiuj jaroj la koncepto restis preskaŭ senŝanĝa. La cilindrovolumeno estis iom post iom pligrandigita de 1,1 litro al 1,6 litro. Potenco kaj pinta rapideco ankaŭ pligrandiĝis, tute kiel la pakaĵospaco. Kaj la luneto, kiu servis kiel malantaŭa fenestro, estis anstataŭigita de granda fenestro.
En 1978 la eŭropa produktado haltis en la fabriko de Emden. En 1974 la Skarabo estis anstataŭigita de la Golf, kiu siavice fariĝis vera ikono. Al la Skarabo oni donis novan vivon sub la formo de la New Beetle (nova skarabo), ne plu kiel aŭto de la popolo, sed kiel amata ilo de la junuloj.*(Laŭ HBVL, 07.02.2016)*

STUDIE VAN HET NEDERLANDS IN DUITSLAND

Voor het Euregio-College in Würselen vormt het onderwijs van vreemde talen naast het Engels een traditioneel bestanddeel van het schoolprogramma. Zo kunnen Nederlands, Frans of ook Spaans vanaf het begin van de studies in het college worden geleerd. Kennis van een tweede vreemde taal naast het Engels is een voorwaarde om toegelaten te worden tot de eindexamens.

Vele studenten maak gebruik van het brede taalaanbod aan het Euregio-college om na het eindexamen betere kansen te krijgen op de arbeidsmarkt of tijdens hun verdere studies. Zo ook de 25-jarige Christine Wieland, die aan het Euregio-college studeert.

Deze handelaarster uit Herzogenrath-Merkstein bezoekt voltijds het college tijdens het derde trimester en zou graag na het eindexamen in Nederland verder studeren of werken. Anderhalf jaar geleden begon zij met de beginnelingencursus Nederlands, en de studie van de taal van dat buurland in de Euregio bevalt haar zeer. Het taaltalent van de jonge studentin viel haar lerares Nederlands, Dorie Kampmann, op, en zij moedigde haar aan zich aan te melden voor het wereldwijd erkende taaldiploma "Certificaat Nederlands als Vreemde Taal", niveau B 1, van het Europees referentiekader.

Vanaf september 2013 heeft Dorie Kampmann Christine Wieland eenmaal per week extra in het kader van een arbeidsgemeenschap op het schriftelijk en mondeling examen voorbereid, en mocht haar ook ter plaatse in Würselen in opdracht van het Nederlands Onderwijsministerie in Leuven examineren. Nu kan Christine Wieland fier haar taaldiploma tonen, waarmee zij na het eindexamen aan een Nederlandse universiteit kan gaan studeren. (Grenzecho,21.01.2014)

SESLINGVA KONVERSACIA LIBRO

Kune kun 18 fakuloj kaj erudiciuloj el Ĉinio, Rusio kaj Usono la ĉina esperantisto WU Guojiang partoprenis en la verkado de la seslingva 251-paĝa libro "100 frazoj en la ĉina, angla, rusa, korea kaj japana lingvoj kaj en Esperanto", kiu estas konversacia libro kun la 100 ofte uzataj frazoj kaj ekzercoj pri 20 temoj. Ĝi eldoniĝis en junio 2015 en Ĉinio, kie ĝi estis tiel alloga, ke entute 5000 ekzempleroj elvendiĝis antaŭ ol eniri la merkaton. La plej grandaj aĉetantoj estas turismaj kompanioj. En 2016 oni intencas ĵeti ĝin sur la esperantan merkaton. Fonto: Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio. GU Guojiang estas ankaŭ la redaktoro de "Informilo de la Ĝemelaj Urboj". Elŝuteblas 53 numeroj: ĵus aperis la numeroj 54 kaj 55.
Retadreso: http://www.esperanto.fi/ghemelurboj



Kunveno de la FEL-estraro

KOMPUTILOJ LERNAS LIPLEGADON
Teĥnologio de la sensona lingvorekono

Kelkaj homoj povas tre bone legi la vortojn de la lipoj de alia homo, sed tamen malperfekte. Tial sciencistoj eksperimentadas per komputiloj kiuj povos transpreni tiun taskon.

Kia progreso okazus, se la bildoj de gardokamerao sufiĉus por por kompreni la vortojn de suspektato! Se pilotoj en siaj kokpitoj povus doni sensonajn komandojn! La esplorantoj de komputiloj esperas povi konstrui estontece komputilojn, kiuj povas legi de la lipoj de parolanto. Sed malgraŭ la grandaj progresoj tiutere la maŝinoj ankoraŭ ne kapablas fari tion.

*Tia sistemo povus esti utiligata por tuta serio da apliko*j, diras Helen Bear de la brita universitato de East Anglia. La informadikistino kaj ŝia teamo disvolvis programon, kiu, sekve de ilia studado, liveros multe pli bonajn sukcesojn ol la ĝisnunaj rezultatoj.

Sur la lipoj multaj sonoj aspektas praktike same. La komputiloj devas lerni interpreti la fajnajn distingojn, kiuj restas kaŝitaj por la homoj. Por tio bezonas persista trejnado. *Lingvo aspektas diverse ĉe ni ĉiuj. Pro tio ni bnezonas modelojn, kiuj bone funkcias ĉe ĉiuj,* diras sinjorino Bear.

Jam en 1968 la klasika sciencfikcia klasikaĵo de "2001, Odiseado en la Spaco", priskribis tiun ideon: la superkomputilo HAL 9000 legas en filmo la lipmovojn de la astronaŭtoj, kiuj enŝloŝis sin por ke la kontraŭuloj ne eksciu iliajn planojn.

La klasika evento – komputilo identifas sur video la movadon de la lipoj: dum parolas persono, la aparato registras la aspekton kaj sinsekvon de la lipmovoj (vizemojn) kaj eligatajn sonojn (fonemojn). Tiam oni ekzamenas helpe de statista modelo, kiel video kaj aŭdio interrilatas. Tiu lernstrategio estas decida parto de la ekzameno.

La sonoj p, b kaj m estas preskaŭ nedistingeblaj sur la lipoj. Tial la programo bezonas pli riĉajn informojn: la ekzistantaj vortoj de lingvo jam limigas la eblan fonemĉenon. Aliajn indikojn donas ankaŭ la frazokonstruo kaj la signifo de eldiraĵo. Ankaŭ multe helpas datobanko kun kuntekstoj de aŭdio kaj teksto. Homa lipleganto konas la esprimojn kaj parolturnojn de sia linfgo kaj la kuntekston de la konversacio. Por komputilo tio estas pli malfacila.

Ankaŭ inter la parolantoj estas grandaj distingoj. Jam tial la prononco devas esti tre klara, la frazoj gramatike korektaj kaj ne aparteni al regiona dialekto. Cetere iuj lingvoj estas pli facilaj ol aliaj .Bona en lingvo estas granda kvanto da konsonantoj. Vokaloj ofte similas inter si. Fatale estas kiam la tonalteco en lingvo ludas gravan rolon. Ekzamenantoj diras, ke, helpe de gardovideoj, fidinda programo povos ebligi pli bonan komprenon por malbone parolantoj kaj aŭdantoj. Kiel digitala asistento en la stilo de Apple Siri kaj Microsoft Kortana, tiu programo povos konstati la sonidentecon de la homoj.

Por eviti superfluajn nomojn de uzantoj, sekretajn nomojn kaj PIN-kodojn, Ahmed Hassanat de la Jordania Universitato Mutah proponas sensonajn pasvortojn, kiu estas malfacile kaptindaj kaj utilaj en laŭtaj ĉirkaŭaĵoj. Por indentifikado ĉe bankaŭtomatoj aŭ on-line-butikoj sufiĉus nur movi la lipojn.

Necesus nur la ĉeesto de kamerao, nenia speciala ekipaĵo kiel por fingropremaĵoj. Eksperimentoj jam montris la potencialon de praktika ŝanĝo.

Sed nenia programo jam atingas altan trafkapablecon, kaj certe ne kiam ĉeestantaj parolantoj nur simple senzorge parolas. Multpromesa estas la uzo de lernkapabla arta intelekto, kiu imitas biologiajn ekzemplojn. Teamo ĉirkaŭ Michael Wand de la fakaltlernejo de la itallingva parto de Svisio atingas per tiel nomataj profundaj neŭronalaj retoj klare rekoneble pli bonan vortrekonon ol per la kutimaj metodoj, almenaŭ en la kazo de limigita vorttrezoro. Kaj paralele oni eksperimentas ankaŭ per aliaj metodoj, kiuj funkcias sen aŭdiosignaloj: parolrekono per mezurado de la muskulaktiveco en vizaĝo kaj nuko. Ultralaŭtaj klakoj de la lango aŭ sekvado de la cerba aktiveco mem – sed plie malpraktika, ĉar ĝis nun nur ebla en malfermita kranio.
Kim Alexander Zickenheimer, Grenzecho, 12.04.2016


MARKO TULIO CICERONO

Por alveni en la itala urbeto Gaeta, kiu situas duonvoje inter Romo kaj Neapolo, oni devas forlasi la aŭtovojon kaj sekvi la Vian Appian, la du mil aĝan vojon, kiu servis por provizi la antikvan Romon kaj sendi legionojn por militi ie ajn en la Roma Imperio. Sur tiu vojo vi rekte vojaĝas tra la antikva historio. Ĉar en Gaeta, aŭ pli precize en la apuda vilaĝo Formia, ofte restadis Marko Tulio Cicerono 1 (106-43 a.K.). La fama romia oratoro, kiu travivis la kulminon de la Romia Imperio kaj la falon de la respubliko, konstruigis tie tombon por sia amata filino Tullia. Sian dumvivan oponadon kontraŭ potencmaniuloj kiel Pompejo, Cezaro kaj Marko Antonio li devis pagi per sia vivo. Li estis murdita proksime de sia vilao de soldatoj de Marko Antonio, kiam tiu ĉi provis uzurpi la potencon en Romo.

La angla aŭtoro Robert Harris verkis la historion de lia vivo en trilogio. En la du unuaj partoj, Imperium kaj Lustrum, li sekvas la supreniron de la juna advokato, kiu profunde enŝuldigis sin kun la espero iam fariĝi konsulo, la plej alta politika funkciulo en la tiama Romo. Ruza edziĝo kun riĉulino, lerta lango kaj bona nazo por intrigoj permesis al li atingi tiun plej altan funkcion. El la senato li estis prijubilata de amikoj kaj malamikoj pro sia politika sagaceco, kvankam li devis konstante atenti pri intrigoj, koruptado kaj la regemeco de militistaj komandantoj, kiuj volis fariĝi aŭtokrato. En la tria parto, Dictatoro, Cicerono devis lukti kontraŭ Julio Cezaro.



Cicerono distingis sin de siaj samtempuloj per sia naŭzo de sangoverŝado. Li hezitis puni per la morto politikajn konspirantojn, kaj li ne vizitis la luktojn de la gladiatoroj. Eĉ mortigado de bestoj plenigis lin per naŭzo. Tio ne estis normala en la tiutempa Romo, kies loĝantoj multe ŝatis la luktojn de la gladiatoroj je vivo aŭ morto. Li trovis perforton malestitika. Laŭ li, malkonsentoj devis esti solvataj per vortoj. Lia lasta kontraŭulo, Julio Cezaro, ne evitis perforton, sed li tro respektis Ciceronon por mortigi lin. Estas tamen apenaŭ kalkuleble, kiom da homoj li buĉis dum siaj militoj. Li ekstermis tutajn tribojn en Gaŭlio, dum tiuj viroj nur defendis sian patrion kontraŭ fremda invadinto. Cicero ŝajnas esti naskiĝinta en por li malĝusta tempo. Li estis humanisto, kiu ŝajnis esti trafinta en por li malbona tempo. Estas mirinde, ke li perseveris tiel longe sian agadon por justa kaj paca socio. Kelkfoje li eĉ eskapis al murdatenco.



La eleganteco kaj belsoneco de la lingvo de Cicerono, en kiu li skribis siajn famajn paroladojn kaj filozofajn verketojn, estas ankoraŭ ĉiam mondvaste admirataj kaj studataj.

Danke al Cicerono kaj Cezaro la latina kulturo estis konservata. La regemo kaj konkeremo de Cezaro efektivigis, ke la Romia kulturo estis disvastigita en granda parto de Eŭropo. Sed dum Cezaro sukcesis konkeri la politikan potencon en Romo, Cicerono donis al ni la intelektulajn armilojn por lukti kontraŭ diktatoroj kaj por demokratio. Cicerono kaj Cezaro estis du gigantoj, sed fine Cicerono, la vorto, .

(Knack, 14.10.2015)

EEN TALENCURSUS IN JE BROEKZAK

On-line leren via Duolingo

Mijn vriend was aan het koken, en ik vroeg hem wat wij gingen eten. “Hai, fame?” vroeg hij met een twinkeling in zijn ogen. “Ragû bolognese. Speciale per la mia ragazza.” Wat was dat nu? Italiaans? Hij? Triomfantelijk haalde hij zijn telefoon uit zijn broekzak en liet me zijn nieuwe app zien: *Duolingo*. “Als je ook een account aanmaakt en vriend met mij wordt, dan kunnen wij er een .wedstrijd van maken. Leg die boeken van je maar aan de kant.”

Vanaf dat moment leren we samen Italiaans, geheel gratis.

Duolingo is een aantal jaren geleden bedacht door professor Louis von Ahn en zijn toenmalige PhD-student Severin Hacker van de Carnegie Mellon University in Pittsburgh. Ze deden dat niet om mensen als mijn vriend en mijzelf gratis talen te laten leren. Het was hun creatieve bijdrage aan een ambitieus project: het vertalen van alle Engelstalige websites ter wereld. Gevorderde gebruikers oefenen hun vertaalvaardigheden met enkele artikels van sites zoals die van CNN en Buzzfeed. Gebruikers controleren elkaar en stemmen om de beste vertaling aan te duiden. Dat is de reden waarom de app gratis is: je inspanningen om een andere taal te leren worden ongemerkt gebruikt voor andere doeleinden.

De app werkt heel simpel. Je maakt een account aan, kiest een taal en *Duolingo*, stippelt een leerpad voor je uit thema’s met onderwerpen als ‘voedsel’, ‘meervoud’ en ‘dieren’. Telkens als je een thema hebt afgerond, krijg je toegang tot het volgende. Als je al wat basiskennis hebt verworden, kun je een test doen om tot een hoger niveau door te stromen. Die test is wel vrij moeilijk, want er zitten ook woorden tussen die je minder vaak zult gebruiken, zoals haai en wol, en je mag maar een paar fouten maken. Als je van competitie houdt, kun je vrienden uitnodigen om mee te doen. Je kunt elkaars vorderingen volgen en elkaar berichten sturen. Op dit moment is alleen de cursus Engels nog Nederlandstalig, maar wie een aardig mondje Engels spreekt, heeft een ruime keuze aan taalcursussen.

Ieder thema bestaat uit een stuk of drie, vier lessen met een aantal oefeningen. Je leest zinnen in de ene taal (het Engels), vertaalt ze dan in de andere taal en andersom. Staat er “I eat an apple”, dan typ je “mangio una mela”. Met enige regelmaat zitten er vreemde zinnen tussen, zoals “De ober heeft negen vingers” en “ik ben een pinguïn”. Verder zijn er dictees en meerkeuzevragen en oefeningen waarbij je zinnen moet schrijven of nazeggen. Je hoort bijvoorbeeld “La ragazza ha una gonna” (het meisje heeft een rok) en dat moet je dan opschrijven of nazeggen. Bij dat laatste kan *Duolingo* nog wel wat verbeteringen gebruiken, want ook slecht uitgesproken zinnen worden vaak goed gerekend. *Duolingo* laat je ongestraft van la ragazza (het meisje) il ragazzo (de jongen) maken. Een ander punt is dat veel oefeningen wel erg gemakkelijk zijn. Dan moet je kiezen wat het Italiaanse woord is voor ‘man’, waarbij de keuzemogelijkheden, onder meer de Italiaanse woorden voor ‘vrouw’ en ‘jongen’, vergezeld gaan van plaatjes. Een uitdaging kun je het niet noemen.

Bij les twee van het thema ‘kleding’ verloor ik voor het eerst een “leven”. Per les krijg je drie levens, en iedere fout die je maakt, kost je er een. Als je al je levens kwijt bent, moet je de les opnieuw doen. Zelf kwam ik verder zonder kleerscheuren door dit onderdeel heen – op naar het onderdeel ‘vragen’.

En groot pluspunt van *Duolingo* zijn de herhalingen. Vroeger was ik op school in oktober alweer de

